# tejo:aktuale

n°507 | Aŭgusto 2025

**Finiĝas la eventpinta sezono.** Sed ne timu, ni havas por vi retrospektivon de la mojosa IJK en Indonezio, aliĝeblecon al JES, alvokon por trejni kaj kompreneble vian plej ŝatatan horoskopon. Legu tiun ĉi numeron de **TEJO-aktuale** kaj eku novan sezonon kun bona sento!

## ALVOKOJ




### Ĉu vi ŝatas trejni?

La komisiono pri Aktivula Trejnado de TEJO okazigos unu trejnadon po monato en oktobro, novembro kaj decembro 2025. Pro tio, ni alvokas vin organizi retan trejnadon por TEJO. Tio estas pagata oportuno (50 EUR po trejnado) kaj malferma al homoj el la tuta mondo. 🙌

Legu pli en la malferma alvoko kaj sendu vian proponon **ĝis la 15-a de septembro**!

## IJK 2025 de tago al tago

Ĉu vi maltrafis la plej ŭaŭindan renkontiĝon de la jaro? Ĉu vere?? 🙀 Spektu la filmetojn por enviigi vin pri kion vi perdis kaj pretiĝi por la klaĉrondo:

Komenco kaj interkonatiĝo (❀˘ᴗ˘)(•́ᴗ•̀✿)

Tago 2: Indonezia vespero, komitata kunsido, katoj kaj dancoj

Tago 3: Ekskurso al akvofaloj, koncertoj kaj katoj (^. .^)ʃ

Tago 4: Amikoj kaj gastoj, movada foiro, trinkomanĝa nokto

Tago 5: Ekskursa tago en la kongresejo, sportludoj, violonoj kaj koncertoj

Tago 6: [Donackampanjo #kuriporkongo, diskutrondo pri Palestino, koncerto de Kordevulo]

[TRINKOMANĜA NOKTO]

---

# ALIAJ EVENTOJ




## JES okazos ĉirkaŭ novjaro 2025/26 en Germanio!

☃ La Junulara E-Semajno (JES) okazos de la 28-a de decembro ĝis la 4-a de januaro en Burg (Spreewald), proksime de Berlino.

Atendas vin granda evento kun pli ol 150 partoprenantoj. Okazos multaj atelieroj, koncertoj, ekskursoj, ludoj, prelegoj... kaj kompreneble granda novjara festo!

Ĉu vi volas veni kaj kunfesti? Aliĝu tuj per [la retejo de JES]!

**[Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!]**




Septembro kunportas miksaĵon de nostalgio, introspekto, intensaj emocioj kaj neantaŭviditaj decidoj pri necesa sinofero. Legu ĉi-sube por malkovri ĉu vi estas la elektito de la universo por transpreni la torĉon.




♈ Vi revenas hejmen post la mirindaj kongresoj kun energio tiel granda, ke vi tuj volas lanĉi novan tutmondan iniciaton. Vi planas tri retajn kursojn, kvin artikolojn, kaj unu ribelon kontraŭ la estraro. La steloj konsilas: trinku teon unue. Alie, viaj amikoj jam nun silente forlasas la babilgrupon.

♉ Post tiom da vojaĝoj vi nur volas trankvile sidi kaj manĝi glaciaĵon. Sed ne: iu petas vin transpreni la librotenadon de la

asocio, ĉar “vi ja estas fidinda”. Ĉi-monate via pacienco estas testita. Sed se vi sukcesos ne ĵeti la kaslibron tra la fenestro, vi fariĝos neoficiala sanktulo de la movado.







♊ Via cerbo estas plena je brilaj ideoj post la kongresoj: nova podkasto, nova TikTok-serio, nova sistemo por revivigi Pasportan Servon en formo de retaj VR-gastĉambroj. La sola problemo: vi ne finos eĉ unu. Sed tio ne gravas, ĉar ĉiuj jam admiras vin pro via senfina energio. Kaj ridetas kiam vi diras “ĉi-foje serioze”.




♋ Vi estas lacega, sed via koro plenplenas pro la memoroj de novaj amikecoj. En septembro vi fariĝos la emocia helpservo de viaj movadanoj. Ĉiu skribos al vi pri siaj dramoj. Vi vere aŭskultos. Sed atentu: ne necesas ke vi estu la psikologo de ĉiuj. Eĉ Zamenhof ne povus trakti tion.




♌La postkongresa deprimiĝo frapas vin forte. Neniu estas tie por aplaŭdi viajn ĉiutagajn eldirojn kaj vi devas kontentiĝi je simpla retmesaĝlisto. Solvo: staru antaŭ spegulo, parolu al vi mem en Esperanto kaj aplaŭdu. Post kelkaj tagoj, vi denove trovos spektantaron… eble en loka klubo, aŭ eble nur en via Telegram-kanalo.




♍ Vi decidas “fari ordon” en la monto da retmesaĝoj, fotoj kaj notoj de la ĵus finiĝinta trimestro. Fakte, vi kreos tutan arkivan sistemon kun kolorkodoj, kategorioj kaj Google-folioj. Neniu petis tion, sed fine ĉiuj uzos ĝin. Vi estos heroo… sed nur post du jaroj, kiam iu hazarde trovos vian bone etikeditan dosierujon.




♎Feliĉan naskiĝmonaton, Pesilo! Vi eniros septembron kun la energio de iu, kiu ĵus revenis el banurba feriejo, sed en la realo nur el UK kun tro da kafpaŭzoj. Ĉi-monate vi estos la mediacianto inter du kverelantaj generacioj: la veteranaj grumbluloj kaj la TikTok-fajreroj. Ĉu vi sukcesos? Jes, sed nur se vi pagos per ĉokolado.




♏ Vi pensas pri ĉiuj eraroj, kiujn homoj faris dum la kongresoj, kaj planas longan, akran blogartikolon pri “la vera stato de la movado”. La steloj diras: bone, skribu ĝin. Sed publikigu nur la duonon. La cetero restu en via privata taglibro, ĉar alie vi hazarde ekigos tri novajn skismojn.

♐ Vi ankoraŭ ne revenis hejmen. Vi diras, ke vi “reiras post semajno”, sed ĉiuj scias,




ke vi simple ne scipovas ĉesi vojaĝi. Septembro donos al vi la ŝancon trovi novajn amikojn en la plej malverŝajnaj lokoj. Eble vi hazarde starigos Esperanto-klubon en busveturo. Nur atentu ne perdi la dorsosakon… denove.




♑Reveno al laboro signifas, ke vi devas malfermi la retpoŝton post du monatoj. La rezulto? 378 mesaĝoj, el kiuj 360 estas “ĉu vi povas helpi pri…?”. Vi sentas vin kaptita. La steloj tamen konsilas: elektu unu projekton kaj lasu la ceterajn atendi. Jes, vi rajtas ignori la tutan Telegram-kanalon dum semajno. Vere.




♒Vi alportas freŝajn, utopiajn ideojn al via grupo: aŭtomata voĉrekono por kongresaj protokoloj, holografia traduko, aŭ Esperanto-kluboj en la Luno. Iuj ridetos, iuj rulos la okulojn, sed vi ja plantas semojn. Post dek jaroj ĉiuj pretendos, ke estis ilia ideo. Sed ni scias la veron.




♓Vi sentas nostalgion pro ĉiuj brakumoj kaj kantoj de la somero. Septembro por vi estas monato de revo kaj melankolio. Vi komencos verki kanton en Esperanto pri amikoj, kiuj loĝas tro malproksime. Publikigu ĝin. Ĝi eble ne gajnos premion, sed ĝi helpos al ĉiuj memori, kial ni ankoraŭ kunvenas, malgraŭ la kaoso.

---




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interesajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas unufoje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-Volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2025 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?*    unsubscribe from this list    update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands